



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 221

Septembro 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

IU NE RIMARKINDA SEPTEMBRA TAGO

La dek unuan de septembro falis homo iale mortita,
tuta kun tiu homo nacio kaj siaj kompatantoj eruptis,
popolo kalkanume fremdan subtenon suferis vulkanizigita,
En la strato, sur la teron, en kaj per homaj manoj sangis.

La dek unuan de septembro vundiĝis nacio, ĉu ploris la homoj?
Ili pasive perforte parto iĝis de la komuna sangantaĵo de nacia viandejo.
Enlande homamaso por vivi mortis, ĉu la politikaj subtenantoj?
Strebante je morgaŭo pli bona, ili alilande babilis en iu drinkejo.

Tamen la prostrebantuloj sangterkovritaj solece spirite babilis en iea tombo,
iliajn voĉojn neniu aŭdante aŭsultas, sed akre iu kriis ĉar la bruo estas tro.
Sekvesekve la maŝino marŝis ien, kie la vivo vive mortis kontraŭ dolaro.
Dolore dividita kaj justecosoifa antaŭen malamiken volis iri la homaro.

Dume la homoj, kiuj neniam aŭsultiĝis, eksilentis.
La liberecen strebantuloj serĉis ilin ĉie, kaj trovinte ilin neniam nenie,
anoncis al la mondo, „Ĉio en ordo! Jam ne estas problemoj.” La mondo
ĝojis.

„La malamiko supoziĝis malvenkita”, verŝajnis la registaro, neniam mensogus ĉi
tie.



Post la terorista atako, subtenita pro eksterlandulaĉoj, la nacio sekve suferis ankoraŭ,
 la voĉoj silentis, la suferado „malaperis”, la venkinta voĉaĉo sakra mentis malbenojn por bongustigi mensogojn.
 La sankta tero ruĝiĝis, la homaro malkuraĝiĝis, estis aŭdaco for kaj eblis nenia morgaŭ’,
 la subtenlanduloj kvazaŭ novaĵo hieraŭa jam ne oportuna taksis la tieajn mortintojn.

La ĝisdatan mortilan eksmodan militon celis la registaro,
 tiam kaŝe hodiaŭ male, la teron opinias ne sufiĉe ruĝiĝis.
 je la homaraĵo, ŝakrinda pro milionjaraj flakoj bestrestaĵaj,
 en la hieraŭo pro politiko kaj potenco, same en la hodiaŭo.

La malgloran daton, la dek unuan de septembro de mil naŭcent sepdek tri,
 Allende murdiĝis pere de verdaj biletoj, homoj murdiĝas pere de biletoj verdaj.
 Tamen la usonanoj pensis, „Ne gravas, restas ankoraŭ multe da tempo
 por kompensi „permesitajn” kruelegaĵojn niajn tra la mondo.


Kiam povus okazi denove io simila al la dek unua de septembro,
 kiam mortis iu ne konata homo en fora lando Ĉilio?’
 Nu, ĝis kiam kaj kiom la mondo devas elteni la perforton,
 eble venus preciza tago por vekti Usonon al terura realeco datrevene.

Usono volas regi la mondon perforte,
 La mondo espereble iam pardonos Usonon,
 Sed tio ne eblis ĝis la usonanaro postulus
 de sia registaro pri propraj krimoj la respondecon.



— Verkis Marlon GARREN.
 Presis NASKa Fasko je la 23a de julio, 2004

Pro tio, ke Marlon Garren estas komencanto, li ne bone regas nian lingvon. Tamen, lia kapablo elpensi kaj esprimi profundajn ideojn estas promesoplena. Ni anticipas liajn estontajn verkojn. — la redaktoro.



MAIRE MULLARNEY EL DUBLINO PLUGAS GRAVAN SULKON

Someron de 2004 Pola Radio raportis el la 89-a UK okazinta en Pekino. Redaktoro de la revuo *Esperanto*, Stano Marcek, menciis dum intervjuo kun redaktorino Barbara Pietrzak, ke enketo farita inter kongresanoj donis iom surprizan rezulton. Legantoj de tiu ĉi konata periodaĵo plej ŝatas la rubrikon "Laste aperis". Ĝuste sub tiuj vortoj aperis en la julia-aŭgusta numero mencio pri la tute nova verko "Maire Mullarney argues about Language" (Maire Mullarney argumentas –kaj eble ankaŭ ‘disputas’— pri lingvo) kaj tiamaniere mi trovis la kreaĵon de konata aktivulino el la irlanda ĉefurbo. Verŝajne multaj konas ŝian libron "Everyone's Own Language" (Ĉies propra lingvo), kiu aperis en la jaro 1999. Ĉi tiu presfreŝa verko estas publikigita ĉe Arlen House en majo 2004.

La enhavo konsistas el skribaĵoj, kiuj estas surpaperigitaj dum 20 jaroj; kelkaj el ili estas tute hodiaŭaj kaj ĉiuj kompreneble validaj kaj utiligeblaj ankaŭ estontece. Temas pri artikoloj, kiuj traktas lingvan komunikadon en mondaj kadroj. Kompreneble ni devas persiste flegi informan agadon kaj tiucele ni daŭre bezonas taŭgan materialon. Maire Mullarney etendas sian manon kaj efike subtenas nian strebadon sur tiu ĉi kampo. Esperanto estas lingvo de egaleco, paco kaj espero.

Oni citas sur la paĝoj de la verko eldirojn de konataj lingvistoj - ekzemple de Mario Pei, Umberto Eco, Robert Phillipson, J.C. Wells kaj de multaj aliaj. Kiel entuziasma aktivulino nia ĉarma irlandano havas multajn proprajn, interesajn spertojn plukitajn el internaciaj kongresoj kaj pri tradukado kaj pri interpretado. Korea doktoro So Gilsu akcentas la fakton, ke post dudekjara studado de la angla lingvo li ankoraŭ ne havas sufiĉe da kuraĝo por uzi ĝin dum diskutoj en grandaj renkontiĝoj. (*) Simile argumentas japano Okamura Rinzo, kiu nuligas la fantaziaĵon, ke la angla estu la dua lingvo en Japanio. Tiu aserto estas absurda, li diras. La japana lingvo estas la plej taŭga inter japanoj kaj por la monda komunikado sufiĉas Esperanto. Ni pripensu aferojn sincere kaj malferme sen antaŭjuĝoj. Estono Henrik Seppik montris en sia lernolibro "La tuta Esperanto" kiel bele la akuzativo kun la finaĵo "-n" faciligas la lernadon de Esperanto kaj donas multajn alternativajn eblojn por liberiĝi el vortordaj katenoj.

Tre amuze oni rakontas, kiamaniere Maire Mullarney ekkonis la Zamenhofan lingvon en la viena Esperanto-muzeo. Ŝi estis tiam jam preskaŭ 60-jara. Rapide la aŭtoro - cetere patrino de 11 infanoj - enkapigis la lingvon, kaj daŭre ŝi ageme kaj senlace kontribuas sur informa kaj instrua kampoj, kvankam ŝi jam havas 83 jarojn. Ridetanta Dublinano rigardas legantojn sur la kovrila paĝo de multflanka, nova libro. Ŝi apartenas al la grupo de sukcesaj informantoj, pri kiuj mi menciis nur kelkajn: Claude Piron, Sylvan Zaft, Ulrich Matthias, Pierre Janton kaj

